Zone €uro - €ûroejo : 3,50 €
Autres pays - Aliaj landoj : 4,50

Organe de l'Union des Travailleurs Espérantistes de langue française

La SAGO
La SAT-Amikara GazetO
RETE
*Espéranto : vers une culture sociale sans frontières*
*Esperanto : al senlima socia kulturo*

sat-amikaro.org

Bimestriel - Dumonata
161
Majo - Junio 2025

**Après – post Vigy**

# 98-a SAT Kongreso

## 09-16 aŭgusto 2025

**Maison culturelle de l'espéranto – Château de Grésillon –**
**Kulturdomo de Esperanto - Kastelo Greziljono**
**Baugé- Maine et loire - France**

**apud Angers kaj Luar-Valo, multe por viziti**
**près d'Angers et la vallée de la Loire très touristique,**

**Venez nous rejoindre,**
**nous vous accueillerons chaleureusement.**
**Varman bonvenon**
**Des hôtels à Baugé -2 km- si vous voulez plus de confort**
**hoteloj eblas**

**Bulletin d'adhésion - aliĝilo :**

parce que le site de SAT est de nouveau piraté, contactez nous chez :
Bruno HENRY, 142 rue des bouvreuils FR 57290 FAMECK
**financoj@satesperanto.org**
SAT Amikaro, sekretario@sat-amikaro.org **ou +33 (0)6 78 97 53 45 ni transdonos**

Ni proponas tri ekskursojn, kiujn vi povas mendi ekde nun :

**- Lun.10/8 duontaga ekskurso, D1-Kokanjaj ĝardenoj 10 €**

**- Mer.13/8 tuttaga ekskurso, T1-Doué la Fontaine kun pikniko 32 €**

**- Ven.15/8 duontaga ekskurso, D2-Helico de l'Orbiero 25 €**

**La programo estas sur: https://eventaservo.org/e/ad39fc**

# VORTO DE LA KASISTO

Saluton al ĉiuj,

Dum nia SAT-Amikara kongreso en Vigy, ni cerbumis pri la futuro de nia asocio.

La malkresko de niaj aliĝantoj gravegas.

Kiel daŭrigi niajn aktivaĵojn, la Sago papere, konservi nian sidejon, Bd Vincent Auriol ? Kiel inciti la homojn de niaj kluboj aliĝi al SAT-Amikaro ?

Kiel uzi la novajn komunikad-mediojn sen forgesi la homojn kiuj ne uzas ilin ?

Evoluigi nian reton petas konojn, ne ĉiuj povas aŭ havas la kompetentecon pro tio.

Estas multaj demandoj al ĉiuj kaj ciuj respondoj estos bonvenaj. ■

## SAT-Amikaro - BILAN AU 31 décembre 2024

| ACTIF | | | | | PASSIF | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Nature | Brut | Amortissements et Provisions | Net 2024 | Net 2023 | Nature | Net 2024 | Net 2023 |
| Immobilisations | | | **69017,51** | **76779,09** | Fonds associatif et réserve | 224393,76 | **244975,65** |
| Constructions | 298548,17 | -261774,95 | 36773,22 | 44069,96 | | | |
| Matériel, Mobilier, Agencem | 19903,87 | -19747,76 | 156,11 | 620,95 | Fonds associatif | 198974,35 | 214538,44 |
| Prêts | 24975,00 | | 24975,00 | 24975,00 | Résultat de l'exercice | -20581,89 | -15564,09 |
| Titres de Participation | 7113,18 | | 7113,18 | 7113,18 | Caisse de solidarité | 11708,28 | 11708,28 |
| Dépôts et Cautions | | | 0,00 | 0,00 | Dotation Congrès | 1756,74 | 1756,74 |
| | | | | | Fonds réserves nouvelles éditions | 32536,28 | 32536,28 |
| Stocks | | | | **58283,58** | | | |
| Stock Librairie | 117283,56 | -59261,34 | **58022,22** | 58283,58 | | | |
| Produits à recevoir | 0,00 | | 0,00 | 4308,17 | | | |
| Créances | 2722,32 | | 2722,32 | 2722,32 | Dettes | 819,00 | **2110,5** |
| Avance Fournisseur | 400,00 | | 400,00 | **0,00** | Adhésions à vie | 310,00 | 350 |
| Disponibilités | | | **95050,71** | **104992,99** | Abonnts perçus d'avance | | |
| LBP (La Source) | 3190,91 | | 3190,91 | 2783,08 | Adhésions perçues d'avance | 362,00 | 1395 |
| LBP (Libroservo) | 1804,12 | | 1804,12 | 3497,11 | Dettes Fournisseurs | 147,00 | 365,5 |
| Compte UEA | 1953,85 | | 1953,85 | 2013,85 | | | |
| Compte autre (Paypal) | 0,00 | | 0,00 | 0,00 | | | |
| Compte Livret LBP | 6821,70 | | 6821,70 | 842,80 | | | |
| La Nef | 80904,22 | | 80904,22 | 95759,31 | | | |
| Caisse | 375,91 | | 375,91 | 96,84 | | | |
| **TOTAL** | **565996,81** | **-340784,05** | **225212,76** | **247086,15** | **TOTAL** | **225212,76** | **247086,15** |


CPPAP n° 0322 G 86224
ISSN : 1763-1319

*Directeur de la publication et Ĉefredaktanto :*
Lucette ECHAPPÉ

*Imprimé par :*
L'Arbre aux Papiers, 72100 Le Mans
Dépôt légal à parution.

*Enpaĝiganto :* Jean-François BLIN

*Redakt- kaj kontrol-skipo :*
Patrick LAGRANGE, Anne-Marie ARGNEY, Marielle GIRAUD



***Kasistino* : Solange VAN LANDEGHEM**
12 rue de Charente, F-18 000 BOURGES
*kasisto@sat-amikaro.org*

**Revue bimestriel de SAT-Amikaro**
132/134, bv Vincent-Auriol, 75013 Paris
Tel. : 0 *(0 33)* 9 53 50 99 58
sekretario@sat-amikaro.org
**Retejo** : sat-amikaro.org


| **Tarifoj** | **Be, CH Fr** | **Aliaj landoj** |
|---|---|---|
| Kotizo (kun abono 60%)<br>*Cotisation (avec abonnement)* | 40,00 € | 50,00 € |
| Kotizo sen abono<br>Cotisation sans abonnement | 18,00 € | 18,00 € |
| Abono al la SAGO (nur)<br>*Abonnement à la SAGO (seul)* | 35,00 € | 42,00 € |
| Junulo (malpli ol 25 jaroj), senlaborulo, kunul(in)o<br>*Jeune (moins de 25 ans), chômeur, conjoint(e)* | 20,00 € | 25,00 € |
| Subtenkotizo (abono 30%)<br>*Cotisation de soutien (abon. 30%)* | 80,00 € | 100,00 € |


Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.

# Sinteza raporto
# Post SAT Amikara KONGRESO dum duobla renkontiĝo – en Vigy

## Unua laborkunsido :

Ĉeestas ĉiuj komitatanoj (Ansofi, Lumeto, J-François, Marielle, Elizabet, Solange) kaj plie Frank Mintz kaj Françoise Guillaumé, Erik Eliard, Claudine Guéguin, Bruno Henry, Patrick Lagrange, Annie Griffon, Ĵaklino Lepeix. Vinko Markov. Petro Grollemund venis fine.

Ansofi : malfermas la kongreson konstatante ke multaj el la ĉeestantaj SAT-Amikoj estas okupitaj en la aliaj partoj de la programo.

Celo de la kongreso : akcepti la raportojn agadajn kaj financaj, diskuti kaj voĉdoni indikocele pri la membroj, **kiuj ĉiuj esprimiĝos referendume.**

Transdonas salutojn de pluraj membroj, Konstatis malfavoran situacion respektive en Bouressse kaj Grezijono.

Vinko : salutas nome de SAT kaj informas pri :

**La 98a kongreso kiu okazos inter la 9a kaj la 16a de aŭgusto en Grezijono.**

Ni omaĝis al la ĉi-jaraj forpasintoj.
Ni konstatis, agnoskis nian laboron, malgraŭ la malfacilaĵoj, pri
- arkivoj,
- kursoj surloke kaj rete, distance
- budoj, forumo, eksteraj rilatoj,
- eksterparizaj regionoj.
- mastrumo de la 2 eksteraj keloj, pri kio pluraj esprimiĝis
- mastrumo **d**e la sidejo mem
- retejo kaj
- sociaj retoj. Ĉefe Henri Masson aktivas en nia diskutlisto
- Pri La Sago, Marielle multe helpis, Jofo plu enpaĝigas. Li klarigas teknikajn punktojn ekz pri Gandi kaj Ovh ; li atenteme zorgas pri la tuta retejo, kaj proponas plian adreson por indiki al li se vi vidas fuŝaĵon admin@sat-amikaro.org

## Dua laborkunsido :

**Ansofi invitis J. Luc Tibias, por Esperanto grand Est kaj Nancy,**

Solange multe klarigis pri elspezoj, pri devigataj vorkoj por la kunproprietejo, bd Auriol.

J. Luc Tibias diris ‘’ pri malfacilaĵoj, same pli malpli en ĉiuj asocioj. ‘’ Tiu renkontiĝo montras bonan ekzemplon de kunagado, Lokaj eventetoj tre utilas por allogi la lernantoj. Tial gravas ĝisdatigitajn retejojn. ‘’

Poste ĉiuj esprimiĝis pri spertetojn en diversaj lokoj.

## Tria laborkunsido :

Ansofi gratulis al Marielle pri sia bela prelego kiu kuraĝigas nin.

Poste ĉiuj esprimiĝis pri devigata kvaliton de LA SAGO ; pri novaj rubrikoj petataj (ĉefe de Franck Mintz) ; Ankaŭ misfunkcio de ‘’La Poste’’ kaj kreskanta prezo por sendado,

Same ĉiuj larĝe esprimiĝis pri uzo de sociaj retoj aŭ ne.

## Kvara laborkunsido
(fakte resumas la granda laboron farita antaŭen)

Ĉeestas : Eriko, Yann, Piet, Lucie, André Grossmann, Marielle, Lucien, Jofo, Lumeto, Elizabet, Solange, Ĵaklino, Bruno, Daniel, Pierre, Vinko. Patrick, Denise, Roland, Weber, Bruno, Simone, Daniel. Franck, Françoise. Pjero.

Cele informi plurajn membrojn kiuj ne povis ĉeesti antaŭe, Ansofi rediris **: ‘’hieraŭ’’ la agadraporto estis unanime voĉdonita de 14 personoj.**

Eriko: ĉi-posttagmeze intervenos iu kiu priskribis situacion en Goma. Nomis la terorisman grupon ADF Nadu, ligita al Islama Ŝtato. Ne estos menciita dum la kunveno por ne endanĝerigi lin. Ĉiuj intervenantoj parolos dum duonhoro. Joel Muhire sendis filmetojn.

Lafi Charles klarigos ne eblon partopreno de senegalanon en Aruŝa.

Ansofi: grave ĉi-matene ricevi informojn pri Afrikanoj, ni ĝojas lerni de ilin.

En Europo, ĉie la grupetoj pluvivas laŭ siaj ebloj. Multaj agadoj kun malmulta rezulto proporcie. Multe ni parolis pri la sidejo kaj

keloj, kiujn ni havos malfacilaĵojn konservi pro elĉerpiĝo de la monrezervo. Regule havas deficiton. Solange emfazas : monrezervo fandiĝas, sed ni ankoraŭ ne estas en senelirejo.

Tamen ni devas cerbumi pri la tuja estonteco konservi la sidejon aŭ ne, ni faris diversajn hipotezojn.

### Eble positiva eventeto :
### propono de Jofo Blin – komitatano - :

**J**am de unu jaro Jofo, post longa cerbumado proponas du sufiĉe grandajn ĉambrojn en sia domo por stoki materialon por SAT **kaj** SAT-Amikaro. Sendis mapon kun dimensioj.

Tiu loko estas bone atingebla per trajno, aŭto.

Kompence proponus starigon de vivdaŭra kontrakto (viager). SAT-Amikaro tiam devus pagi la lokajn impostojn kaj iom pli. Tio estus entute 3 000 eŭroj jare.

Solange : konsiderenda propono nur kaze de vendo de la sidejo. Se ne estus aldonaj elspezoj.

Jofo kaj Lumeto multe laboras por plibonigi retejon kaj sociajn retojn. Jofo klarigis pri malaktivaj ligiloj interalie. Ansofi : afablaj rimarkoj bonvenaj pri la misfunkciado, cele al korektado.

Ansofi : reparolis pri la SAGO, ilo por la membroj. Celas informi la membrojn pri la diversaj agadoj. Kvalito de ĝi : la longaj artikoloj estu akompanataj de resumoj, sed pretigotaj de la verkantoj mem.

Pri FEI, komuna institucio de SAT-Amikaro kaj Espéranto-France, montras kunlaboro inter la du franclingvaj asocioj ; ne nur zorgas pri ekzamenoj.

Pasintjara kongreso en Kvinpetalo. Kiel Greziljono, ili estas komunaj posedaĵoj de esperantistoj, kie eblas renkontiĝi kun esperantistoj el la tuta mondo.

Sendo de materialo al Afriko ĉiam pli malfacila, interalie pro altiĝo de sendokostoj.

Babilrondoj por la parizanoj kaj vizitantoj ; kelkaj ŝanĝoj farendaj en la sidejo pro sekureco. Duobla Z-festo en Parizo refarenda.

**Financa raporto** montris deficiton de 20 000 eŭroj. Tio instigis debaton pri ebla maniero kreskigi la enspezojn. Neceso plibonigi la retan vendadon de libroj, malgraŭ ke ‘’homoj malpli legas’’.

Ansofi : **retejo** estas grava montrofenestro, interalie por novaj esperantistoj.

Elizabeth : multaj esperantistoj havas vidproblemojn, necesas tion pripensi.

Ansofi: sidejo plej alta parto de la elspezoj. Ni listigis kelkajn kialojn por provi konservi ĝin. kaj riparoj necesaj por igi ĝin pli sekura.

SAGO estas la dua grava elspezfonto. Kotizoj kaj abonoj nun ne kompencas la elspezojn. Ni konkludis pri plialtigo de la kotizoj ĉar la plimulto deziras konservi paperan gazeton. Kotizaltiĝo de 2 eŭroj. Legantoj povos elekti inter papera kaj reta solvo, **sen** diferenco en la kotizo.

Multe da diskutoj/cerbumoj pri LA SAGO, eĉ por subtenkotizo , fine :

Voĉdono : por senlaboruloj kaj junuloj : 20 eŭroj.

2 kontraŭas. Sindetenas : 2 . Por : 11

Solange : **prezentas la kontojn :**

**ni perdis 10 000 euroj ciuj tri lastajn jarojn !!! Tiu sumo estas la diferenco inter elspezoj kaj enspezoj. Alie diri, ni ne enspezas sufice por kompensi la elspezoj.**

Iom da profito (500 eŭroj) okaze de la kongreso en Bureso.

**Voĉdono : aprobite unuanime de la ĉeestantoj.**

**Denove :** Granda diskuto pri la enhavo de la SAGO kaj ĝiaj celoj kiel informilo pri la asocia laboro, kaj pri diverstemaj artikoloj. Neceso reenkonduki kelkajn regulajn rubrikojn, ekzemple pri pedagogio, aŭ tuttaga vivo, ekologio, ktp

*Atentu proksime 60 procento, leĝe, devas koncerni ĝeneralan informon por obteni cppap (pli favora prezo por sendo kosto)*

Marielle : memorigas, ke **Renaud** skribis raporton fine de sia staĝo. Temis pri studenta laboro tre interesa, ĉar li donas vidpunkton de junulo pri SAT-Amikaro. De tio ni povas elĉerpi ideon pri kompreno de niaj problemoj. Prefere ni demandu lin resumi kaj diskonigi la interesajn partojn. Ansofi : **redaktado de la Sageto estis efektivigo de lia propono.**

Roland kaj Piet : tamen interese resumi kaj elĉerpi ideojn por la SAGO.

Vinko : ja, frama-iloj kun malpli da kapabloj.

Eriko : en la malnovaj statutoj, oni celas propagandi ĉe avangardistaj medioj. Sed aktivuloj fakte jam tre okupitaj. **Ankaŭ migrantoj estus grava celgrupo**. kvazaŭ denaske mondcivitanoj. Ili plenumas la plej malalt-klasajn profesiojn. Sed ne ĉiuj havas legitimilojn.

Patrick : Mi estas preta instrui rete al pli da lernantoj. preskaŭ ĉiuj komencis lerni per la reto, poste volas parolkurson.
Piet : du specaj retaj kursoj. Por memstudo aŭ kun interŝanĝoj.

Ni multege cerbumis pri malgraveco (affaiblissement) de franclingvo, kaj kresko de la anglan aŭ laŭ esprimo de Yann « usona lingvo, orientita al kapitalismo », Piet revenas al la rimarko de Patrick. : izolitaj 70% da esperantistoj verŝajne rapide kabeas. Devus tamen provi unuigi ilin en iu komunumo.
Ansofi : la ekzistantaj informiloj ne speciale estas direktitaj al la studentoj. Io el ili reuzenda por adaptiĝi al la loka celpubliko.

Niaj amikoj : Lafi Charles el Dakar, Joël, Judith kaj Jean el Kongo lando, François el Benino, Henriel kaj lernantino de li, - el Madagascar- instruis al ni pri diversaj temoj. Aŭdeble ili estis pretaj, multe pli interparoli. ■

# REFERENDUMILO 2025

**Agadraporto** jesas ( ) kontraŭas ( ) sindetenas ( )

oui ( ) non ( ) abstention ( )

……………………………………………………………………………………………

**Bilanco** jesas ( ) kontraŭas ( ) sindetenas ( )

oui ( ) non ( ) abstention ( )

…………………………………………………………………………………………..

**Iom kreskado** jesas ( ) kontraŭas ( ) sindetenas ( )

kotizo 2 eŭroj oui ( ) non ( ) abstention ( )

……………………………………………………………………………………………...

**Serioza studo por** translokiĝi sidejon jesas ( ) kontraŭas ( ) sindetenas ( )

oui ( ) non ( ) abstention ( )

**Bonvolu sendi antaŭ la 30 a de julio,**
Ni nombros la rezulton, en Parizo kelkaj tagoj poste.

## KANDIDATO

Sciante ke normale vi devus esti membro de SAT de jam 2 jaroj por kandidati ĉe SAT-Amikaro, do cele esti preta agi venontjare 2027 :

- ĉu vi ŝatus preni – en duobla rolo (binome) – etan precizan taskon ? JES ( ) NE ( )

se jes , de préférence dans quel domaine ? Prefere kia :

( ) - responsable régional pour la collecte des articles, pour la relance des adhérents locaux ?……

( ) - vice trésorier (ère) …………………………………….

( ) - vice secrétaire …………………………………….

( ) - vice metteur en page La SAGO …………………………………….

( ) - autre …………………………………….

Sciante ke eĉ se oni konas la asocio de longtempe, bezonas tempo por informiĝi pri ĉiu, tio demando valoras por ĉiujn,

Bonvolu resendi al : Solange Vanlandeghem, rue 12 rue de Charentes, 18 000 BOURGES

aŭ rete ĉe kasisto@sat-amikaro.org kaj paralele ĉe admin@sat-amikaro.org

# JARAGADA RAPORTO-2024 (30/4/2025)

***Lafi Charles DIATTA*** *- Sekciestro de Senegala ILEI-Sekcio k* ***Assane FAYE*** *- Prezidanto de Senegala Esperanto-Asocio*

Post la nekontestebla sukceso de la 8-a Afrika Esperanto-Kongreso okazinta en Senegalo en decembro 2022, senegalaj esperantistoj esperis partopreni en la unua Universala Kongreso de Esperanto en Afriko, en Tanzanio, en aŭgusto 2024, la 109-a UK.

Tiel, en 2023, estis esperanto-kursoj ĉeeste kaj distance.

En 2024, dum la unuaj du jaroj okazis regule distancaj kursoj, per vatcapo.

De marto 2024 estis konstatite paŭzo de marto pro grava socipolitika tumulto post kiu Senegalo

distingiĝis per la elekto de sia kvina prezidento, 44-jaraĝa.

Distanca lernado rekomenciĝis en majo 2024, kun diskutoj pri lokaj aktualaj temoj okazintaj unufoje semajne.

Komence de junio 2024, ses (6) senegalanoj estis elektitaj por vojaĝi al Arusha, en Tanzanio cele al partopreno en la unua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Afriko. Tio naive entuziasmigis tiujn senegalajn esperantistojn, ĉar estintus la unua fojo, ke ili ĉeestintus tutmondan kongreson de Esperanto. Do ĉi-tiuj senegalanoj komencis prepariĝi.

Sed finfine neniu senegala esperantisto ĉeestis tiun kongreson en Tanzanio; kial?

Oficiale, tio estis ĉar la senegalanoj ne akiris vizon por eniri Tanzanion.

Dum 10 tagoj la senegalanoj senĉese komunikis kun tanzaniaj esperantistoj el la lokaj kongreso- komitatanoj, kun la reprezentanto de UEA por Afriko, kun membroj de la Afrika Komisiono de UEA, kun altrangaj oficistoj ĉe UEA, kun esperantistoj havantaj iom da sperto pri Afriko.

La historio registras, ke neniu esperantisto, nek el Tanzanio, nek el la Afrika Komisiono de UEA, nek el UEA, neniu esperantisto partoprenanta en tia kongreso (historia kongreso), neniu esperantista diplomatio helpis, por tiel diri, la senegalanojn por ricevi rajtigon eniri Tanzanion ; kial?

Ne nur la senegalanoj ne partoprenis en tiu kongreso, sed, de 2024 ĝis la fino de aprilo 2025 neniu repago de elspezoj faritaj de senegalanoj, neniu el la dokumentoj disdonitaj al afrikanoj (ĉu legolibroj, ĉu lernolibroj, ĉu libretoj, ĉu T-ĉemizoj, ktp.) atingis neniun senegalanon ; kial ?

Esperantistoj el la tuta mondo, imagu, imagu la seniluziiĝon, imagu la malkuraĝiĝon de tiuj senegalanoj, kiuj devintus unuafoje ĉeesti universalan kongreson de Esperanto. Imagu la malkuraĝiĝon ĉe komencintoj kaj komencantoj, imagu ilian malkuraĝiĝon en la lernado de Esperanto...

Koran dankon al Anna Lowestein kiu permesis al ESPERANTO-SENEGALO havi ekspozician tablon, eĉ se ĝi estis malplena kaj sen iu ajn ĉeestinta senegalano por informi la kongresanojn pri la agado de Esperanto-movado en Senegalo.

Kara Anna, bonvolu permesi al ĉiuj senegalaj esperantistoj kuraĝigi vin kaj viajn du filojn post la forpaso de profesoro Renato Corsetti, kiun multaj senegalaj esperantistoj konis persone, distance.

Post la ŝoko kaŭzita de la nepartopreno de senegalaj esperantistoj en la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Tanzanio, neniu grupa agado estis organizita ĝis fino de oktobro 2024.

De la 16-a de novembro ĝis la 14-a de decembro 2024, dank' al la volo de Julio CALLEGARI, brazila esperantisto, estis organizitaj ĉeestaj kursoj en la skolta domo de Rufisko. Dankon kara Julio.

Sed, tre entuziasmaj, komence de tiuj kursoj, la lernantoj ne plu venis al la kursoj. Post trifoje sinsekve prezentiĝi ĉe la klasloko sen trovi iun ajn, la instruisto (Lafi) ĉesis iri. La lernantoj, ili ĉiuj estas lernantoj kaj studentoj, diris, ke ili ne plu havas tempon ĉar ili dediĉas sin al siaj studoj. Krom la aludita manko de tempo, eble estas nedirita kialo pri kiu ni ne konscias. Ni scias nur, ke sinprezento-filmetoj de iuj el tiuj lernantoj/komencantoj estis publikigitaj en la interreto en retejoj, kie ili ne dezirus aperi pro siaj sociologiaj kredoj kaj propraj kredoj kiel senegalanoj; jes Senegalo havas siajn realaĵojn, kiel ĉiu popolo.

LA SENEGALA ESPERANTISTA MOVADO ESTAS EN PERPLEKSO.

Por la reviviĝo de Esperanto en Senegalo... ■